4-a Jaro. N-o 190 APERAS SEMAJNE 24. Majo 1928



ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e
Gvidanto: E. Lanti

SIDEJO de Ekzekutiva Komitato de SAT
23, rue Boyer, Paris-20e

ADMINISTREJO: Colmstr. 1, Leipzig O 27
Administranto: R. Lerchner

LA IDEALO DE L' PROLETARO

Oni povas konsideri la hodiaŭan socion kiel formitan el tri ekonomioj funkciantaj unu apud la alia. Unuparte, metia ekonomio, ekzistanta precipe en la agrikulturo, kie la laboristo estas mem posedanto de siaj produktorimedoj, kaj kie la homoj nur estas ligitaj unuj al la aliaj per interŝanĝaj rilatoj. Aliparte, du aliaj ekonomioj, kiuj estas ambaŭ karakterizataj per la fakto, ke la homoj estas en ĝi ligitaj reciproke ne nur per la interŝanĝo, sed egale en la produktado. Tiuj ĉi du ekonomioj estas fonditaj ambaŭ sur la ekspluatado de l' proleta laboro per la posedantoj de la produktorimedoj. Ili sin distingas per la fakto, ke unu el ili, la verdire kapitalista ekonomio, estas submetita al la ĝeneralaj reguloj de l' interŝanĝo, kiuj devenas el la ekzisto de merkato, dum la alia, kiun ni volas nomi la monopola ekonomio, evitas pli malpli tiujn regulojn, anstataŭigante pli malpli komplete la monopolon por la merkato.

Tiuj tri ekonomioj ne nur kune ekzistas, ili sin reciproke penetras, reagante unu sur la alian: la monopolo ne atingas izoliĝi komplete de l' libera merkato, la kapitalista industrio devas atentegi la konkuradon de l' metiista ktp. . . .

Sed ekzistas ĝenerala leĝo, kiu volas ke ĉiam la plej novaj formoj de la tekniko superregas en la socia vivo. Tio, kio karakterizas epokon, kio de ĝi formas la politikan kaj socian strukturon, estas tiuj teknikoj kaj ekonomiaj formoj, kiuj estas lastdataj. La manieroj kulturi la grenon en la 19-a jarcento kaj sub la romana imperio ne estis tre diferencaj, ankaŭ ne estas la grenkulturo, kiu faras la civilizacion de l' 19-a jarcento, sed la vapormaŝino; la homo kaj la socio de l' lasta jarcento estas la produkto de la vapormaŝino kaj ne de la plugilo.

La metia ekonomio, konvena al la malnovaj teknikoj, nur jam ludas, malgraŭ la granda disvastiĝo, kiun ĝi konservis, pasivan rolon. La kapitalista ekonomio verdire, kiu estis naskita per la eltrovoj de la industria ekonomio fine de la 18-a jarcento, eltrovoj kiuj havas trajton precipe por la teksa tekniko, ludis rolon superregan dum la lasta jarcento. Sed ĝi hodiaŭ estas forlasanta tiun ĉi rolon profite al la plej nova ekonomio monopola, ekonomio de teknikoj plej laste kreitaj aŭ transformitaj, elektro-tekniko, metalurgio ktp. . . .

Aliparte, super la dialektika interna procezo de l' burĝaro, kiu kondukas la kapitalistan ekonomion de l' libera konkurado al la monopolo, estas alia dialektika procezo de supera amplekso: tiu kiu kontraŭstarigas la Proletaron al la burĝaro.

La antagonismo inter la Proletaro kaj la burĝaro kondukas la Proletaron al la kreado de ekonomio kontraŭa al tiu, per kiu ĝi estas ekspluatata. Ĉu ĝi estu ekspluatata per la sendependaj kapitalistoj aŭ per monopoloj, la Proletaro estas alkondukata voli detrui tion, pro kio ĝi suferas, kaj anstataŭ tio starigi socian ordon, kie la alproprigo de la supervaloro liverita per la laboristoj, flanke de la posedantoj de l' produktorimedoj, fariĝas neebla. Tiu ĉi neebleco nur povas esti atingata per la subpremo de ĉiu privata alproprigo de produktorimedoj aliaj ol tiuj, kiuj persone estas uzataj de siaj posedantoj. Subpremo de l' alproprigo de la kolektivaj produktorimedoj aŭ Kapitalo, estos do la unua karaktero de l' ekonomio, kiu postsekvos al la kapitalistaj ekonomioj.

Sed la alproprigo de la produktorimedoj trans la laborkapableco individua mem nur estis ebla dank' al la rento. Precipe tial ke iuj laboristoj troviĝis por produkti en pli favoraj kondiĉoj ol aliaj, ili povis produkti pli ol la aliaj kaj ili povis ankaŭ amasigi riĉaĵojn, kiujn ili transformis en kapitalon, per kiu ili ekspluatas la laboron de aliaj homoj. Serĉante elsekigi la fonton mem de l' kapitalo, la Proletaro do estas devigata subpremi la alproprigon de la rento. Ke la produktoj daŭrigu interŝanĝiĝi laŭ la labora maksimumo socie necesa, tiel estu! sed ke la diferenco inter tiu ĉi kvanto da laboro kaj tiu efektive elspezita por la fabrikado ne plu povu fariĝi la propraĵo de l' produktanto de la objekto, eĉ de metiisto. La Proletaro sekve devas enmiksiĝi, ne nur en la kapitalista ekonomio, sed egale en la metiista. Subpremo de la rento estos la dua granda karaktero de l' komunista ekonomio.

La funkciado de la kapitalista ekonomio mem metas al la Proletaro ĝian duoblan celon: Sociigo de l' kapitalo kaj Sociigo de la rento, duobla celo, kiu troviĝas resumita en la fundamenta formulo:

Sociigo de la produktorimedoj.

El "L'Economie Capitaliste" (La kapitalista ekonomio) de R. Louzon
trad. N. B.

INSTRUA OKAZAĴO

La granda usona aŭtomobilfabriko "Ĝeneral Motor" konstruis antaŭ kelka tempo filion en Stokholmo por la nord- kaj orienteŭropa merkato. Je la komenco de la produktado, en la pasinta monato, okazis konflikto pri la salajro. La laboristoj, kiuj ŕemburas (drapiras) interne la aŭtomobilojn, postulis altigon de sia salajro, tial ke la laboro okazas tre "raciigite" kaj ke estas postulata ĉiam pli kaj pli da taga laborkvanto. Salajraltigon malaprobis la fabrikestraro. La metallaboristoj ĉe la fabriko simpatiis kun la remburistoj. Ĉiuj laboristoj strikis. Eklaboris kelkaj armitaj strikrompantoj. Alvenis usona direktoro Evans, kiu dekretis: "Aŭ la laboristoj tuj rekomencos la laboron, aŭ ni fermos la fabrikon. La aŭtomobiloj produktataj en Stokholmo povas esti farataj en niaj dana kaj belga fabrikoj." Ĉe tia minaco devis cedi la laboristoj kaj rekomencis labori la 23-an de aprilo. Kapitalistaj gazetoj skribis: "Amerikanoj lernigas al svedaj laboristoj bonmorojn" ktp.

Sed imagu, ke la laboristoj el ĉiuj fabrikoj, kiujn posedas la "Ĝeneral Motor" en multaj landoj, estus organizitaj en unu sama organizo! Tiam s-ro Evans certe ne povus pritrakti la laboristojn laŭ sia plaĉo.

Tiu eta konflikto estas tre instrua. Ĝi montras, kiel la kapitalistoj ignoras la naciojn; kiel la produktado tendencas al trusta, sennacieca organizmaniero, kaj kiel malfruas la laborista organiziĝo kompare kun la malvolviĝo de l' kapitalismo. Kvankam ekzistas ruĝaj, flavaj, bluaj, nigraj, verdaj kaj alikoloraj "Internacioj", tamen la laboristoj agas dise kaj malunuece. Ili nepre devas unuiĝi tutmonde por povi venke batali; ili devas forigi la nunajn diversajn barojn (ankaŭ la lingvajn!); unuvorte: ili devas pli kaj pli organiziĝi kaj agadi sennaciece. La mastroj cetere liveras al ili la bonan ekzemplon.

(7987)

Red. Noto. — Ni profitu la okazon por diri, ke la ĉi supra artikolo estas kvazaŭ modelo pri tiuj, kiujn ni deziras ricevi.

FAKTOJ KAJ KOMENTOJ

Pri senlaboreco en Usono

En la usona agrikulturo la vendoprezo de la terproduktoj ne sekvis la progresadon de l' vendoprezo por industriaj produktoj. La terkulturistoj suferis je tiu ĉi situacio, kaj okazis grandskala hommigrado el kamparo al la urboj. Oni kalkulas 3 milionojn, kiuj forlasis la kamparon. Dank' al la evoluo de l' maŝinoj la terkultura produktado pliiĝis je 10 elcentoj en la lastaj jaroj, dum la terkulturistoj mem samtempe malpliiĝis je 5 elcentoj. En la industrio la ciferoj estas ankoraŭ pli frapantaj. Depost 1919 la indekso de l' produktado leviĝis de 147 al 170, dum tiu de l' manlaboro falis de 129 ĝis 115. La cigareda industrio, ekzemple, pliigis sian produktadon je 53%, reduktante sian manlaboron je 13%; la petrola industrio pliigis sian produktadon je 84%, reduktante sian manlaboron je 19%.

Solvon al la problemo? — Postuli plimallongigon de la labortago.

* * *

La turka registaro decidis, ke estu aplikataj por la turka alfabeto estonte la latinaj literoj. Plie, ĝi decidis, ke por plenumi la transformiĝon, estu uzataj franca kaj angla fonetikaj metodoj.

Espereble la slavoj, japanoj, ĉinoj k. a. ne imitos la turkojn. Estus ja granda paŝo al la unueciĝo de l'mondo. La patriotojn tedus tia monotoneco kaj kredeble ili sin mortigus pro ĉagreno. Terura eventualeco, ĉu ne?

* * *

Laŭ kuracista esploro ĵus farita de la Novjorka tuberkuloza kaj saniga asocio, el 2000 laboristaj infanoj nur 225 estis sen gravaj difektoj. Pli ol la duono havis malsanajn glandojn, 13 elcentoj suferis je malsufiĉa nutriĝo, preskaŭ la duono havis putrajn dentojn, 27% havis difektan vidpovon, 7% estis kormalsanaj.

Sekve ankaŭ en la "dolara lando" kun ĝiaj altaj laboristaj salajroj ne estas garantiata al la laborista idaro bonstata prosperado?

* * *

Laŭ "Laborista Gazeto" ekzistis antaŭ la milito en Ukrainio 26 ortodoksaj episkopoj, nuntempe 95, kaj anstataŭ 10 560 pastroj antaŭmilite 11 700 nuntempe.

Ni ne volas kredi tiun informon trovitan en franclingva ĵurnalo, kiu estas kontrolinda per niaj sovetiaj K-doj. Ĉar se tiuj ciferoj estus korektaj, ĉu ni ne devus dubi pri la sukceso de kontraŭreligia propagando?

UNUA DE MAJO EN BULGARIO

De kelkaj jaroj la laborista movado en Bulgario estas per ĉiuj eblaj rimedoj subpremata kaj sufokata de la faŝista registaro. Tamen la tempo montris, ke malgraŭ persekutadoj, arestoj kaj mortigoj la laborista movado daŭrigas ekzisti. De tempo al tempo aperas laboristaj gazetoj, kiuj post kelknumera apero estas ree ĉesigataj per registara interveno. Laŭ la "leĝo por defendi la ŝtaton" miloj da politikaj kontraŭuloj estas juĝataj, kaj miloj portas sur la dorsoj la teruraĵojn de tiu ĉi leĝo.

Oni ankoraŭ malpermesas al la laborista klaso havi siajn proprajn organizojn kaj gazetojn. La redaktoroj, kiuj skribas ion malplaĉan al la burĝoj, estas juĝataj kiel "malamikoj de la patrio".

Kompreneble, en tiaj cirkonstancoj, la Laboristaro en Bulgario ankaŭ ne povas libere festi la Unuan de Majo. Sed, de du aŭ tri jaroj la laboristoj rekomencis festi la proletaran feston malgraŭ registara malpermeso. En tiu ĉi jaro, kontraŭstare al la registaro, ĉiuj profesiaj organizoj kaj laborista partio eldonis diversajn alvokojn kaj multajn majajn gazetojn, kiujn la registaro konfiskis. Kvar tagojn antaŭ la Unua de Majo la policanoj okupis laboristajn klubojn kaj ne permesis aranĝi sindikatajn kaj partiajn kunvenojn. Eĉ estis malpermesate, ke kolektiĝu pli ol kvin personoj. Multaj laboristoj estis arestataj antaŭ la Unua de Majo, ĉar ili disdonis alvokojn.

Tiel oni festis la tagon. Matene je la 4-a oni komencis aresti laboristojn kaj Centran Majan Komitaton. Matene je la 8-a la policanoj okupis la lokon indikitan por Maja kunveno. Ili estis armitaj per pafiloj kaj bajonetoj kaj estis duope en ĉiuj stratanguloj. La Sofiaj laboristoj tamen plenigis la stratojn, portante ruĝajn rubandojn, kaj laŭ signalo donita ili moviĝis malrapide, formante procesion. Poste oni komencis kanti laboristajn kantojn. Je la 11-a komenciĝis la alparoloj laŭprograme. Parolis laboristpartia deputito. Kiam post la kunvenego ree formiĝis manifestantaro en vicoj, la policanoj alvenis kaj provis dispeli la amasojn. Ili komencis pafi, kaj la manifestantoj ĵetis ŝtonojn. Unu policano estis vundata. Sed fine la amaso estis dispelata, kaj multaj laboristoj arestitaj. Ili estis ĝismorte batataj en la polica oficejo. Matene la policanoj vizitis ĉiujn laborejojn kaj notis la nomojn de la laboristoj, kiuj ne ĉeestis. Kiel rezulto, en urbo Stanimoka, la policestro malpermesis al la fabrikestroj doni laboron al tiuj laboristoj, kiuj festis dum Unua de Majo. En

★ Partoprenu la VIII-an SAT-Kongreson en Göteborg ★
14.—19. aŭgusto 1928

VOJAĜAJ IMPRESOJ EL SUDA AMERIKO

Nia K-do 102 el Oslo (Norvegio) antaŭ nelonge revenis de 10-monata vojaĝo al Suda Ameriko. Ses monatojn li restadis, kvazaŭ "memvola ekzilito", sur insulara grupo en la Pacifika Oceano, iama nesto de nevenkeblaj marrabistoj. Ni kredas, ke ĉiuj konsentos kun ni, se ni donos al li spacon en "S-ulo", por priskribi al ni la plej interesajn detalojn el liaj travivaĵoj.

Red.

I

Iun belan matenon, kiam la suno leviĝis el sia ondlito, ĝi ekvidis ŝipon balanciĝantan sur la vasta Pacifika Oceano. La ŝipanoj kaj pasaĝeroj staris sur la ferdeko, atente rigardante antaŭen, kie la celo de la vojaĝo, en ilia imago, la insulo de l' floroj kaj de la feliĉo, leviĝis el la maro.


Estis la insulo San Cristobal (Kristobal), apartenanta al la insulargrupo Arkipelago de Colon (Kolon), kiun ili alproksimiĝis. Golfeton, kiu formis naturan havenon, ili baldaŭ trovis kaj faligis la ankron. Sesdek tagnoktojn daŭris la vojaĝo, kaj nun ili sin sentis feliĉaj denove surpaŝi firman teron. Sed ho ve! dezerta aspektis la bordo. El la tute seka kaj ŝtona grundo elkreskis griza arbustaro kaj domaltaj kaktoj.

Por esplori la internon de l' insulo mi kune kun tri K-doj iris laŭ malbona vojo al la insula vilaĝo, kiu estas lokita 8 km. for de la haveno. La vilaĝo konsistis el ĉ. 60 kabanoj, tute tegitaj per folioj de sukera kano. La kabanoj havis truon kiel pordon kaj neniun fenestron. En tiuj kabanoj loĝas ĉ. 400 homoj, la indiĝenoj kune kun hundoj, kokoj, porkoj kaj azenoj. Ega malpureco kaj fiodoro regas en la vilaĝo. Ĉifonitaj, nudpiedaj kaj malpuraj estis ankaŭ la homoj. En la vilaĝo troviĝas ankaŭ vilao kun ferpordoj kvazaŭ fortikaĵo, kie loĝas la posedanto de la insulo kaj de la homoj. Krome troviĝas sukerfabriko en mizera stato.

Antaŭ 30 jaroj la respubliko Ekvatoro (Ecuador) uzis la insuion kiel deportejon por siaj krimuloj kaj ribeluloj. Sed ĉar la ĉefo de l' deportejo, sinjoro Cobos, kruela homo, kondamnis obstinulojn je mortpuno, ili en 1904 dum okazo de ekzekuto faris ribelon, kaptis sinjoron Cobos kaj lin tuj senkapigis. Depost tiu tempo la homoj restantaj sur la insulo ĝuas ian liberecon.

La nuna posedanto de tre vasta kaj tre fruktodona plantejo pagas al siaj indiĝenaj laboristoj 1,25 sukre (t. e. ½ dolaron) por 8-hora labortago. Sed la indiĝenoj devas aĉeti manĝaĵon: rizon, viandon, fiŝon kaj brandon de la bienposedanto Alvarado, kaj tiel li facile reprenas la mononon, kiun li eldonis kiel salajron. La varojn, ĉefe kafon, sukeron kaj porkaĵon, kiujn li produktas, li eksportas per propra ŝipo al Gvajakil (en Ekvatoro) kaj vendas ilin al germana komercdomo.

En la vilaĝo ni restis dum sendorma nokto, fidante al niaj pafiloj, se iu volus nin ataki. Sed la homoj aspektis afablaj, kaj nenio malagrabla okazis al ni. Frue en la sekvinta mateno ni ekiris laŭ rajdvojeto tra sukerkano-, kafo- kaj bananplantejoj, kiuj areas kelkajn km². La bananoj maturiĝas dum la tuta jaro kaj superflue estas mencii, ke ili bonege gustumis. Ĉar neeble estas eksporti la bananojn pro longega distanco al merkato, la loĝantoj uzas ilin kiel porkmanĝaĵon.



San Kristobal

Domo de la norvegaj koloniistoj

Kiam ni alvenis ĉe sovaĝa arbara rando, nin atakis deko da bojegantaj hundoj, kiuj baldaŭ estis revokataj de nigrulo, kiu ankaŭ bojegis per sendenta buŝego en iu stranga nekomprenebla lingvo. Li estis duonnuda kaj ŝajne tre embarasata vidante blankajn homojn ĉe si. Ni per signoj kaj donacetoj baldaŭ interfratiĝis. Li havigis al ni freŝan akvon, ovojn kaj du delikatajn ananasfruktojn.

Post unuhora ripozo, ĉar estis varmega tago, ni denove ekiris, kaj la nigrulo kun siaj hundoj nin akompanis. Li multe parolaĉis kaj gestfaradis montrante vojeton tra densa bananplantejo. Baldaŭ ni ekvidis simplan kabanon, kie loĝis blanka homo, ĉifonita longhar- kaj barbulo kun oraj okulvitroj. Tio estis inĝeniero Sen el Latvio, nobla homo, kiu jam de kelkaj jaroj transloĝiĝis al San Kristobalo, por tie vivi izole for de la monda bruado. Kun sinjoro Sen ni havis tre interesan interparoladon en germana lingvo (krom sia gepatra lingvo li bonege estris germanan, francan, hispanan kaj anglan lingvojn. Ni poste lin uzis kiel interpretiston kun la loĝantaro). Li donis al ni tre bonajn informojn pri la cirkonstancoj sur la insulo por enmigrantoj.

Estis jam tagmeze, kiam ni devis adiaŭi s-ron Sen por atingi nian tiutagan celon, la plej altan monton sur la insulo.

Muri.

(Daŭrigota.)



EL POLIO

Laborinspektejo

Mi estas komisiita viziti la laborinspektoron de la koncerna distrikto, por laŭleĝe konfirmigi la "libron de salajroj". Kun la libro subbrake mi marŝas al la celo. La tuta listo de salajroj troviĝas ĉe mi! Eklogas min tento, rigardi ĝin. Kiom perlaboras tiuj teksistoj, laborantaj 12—14 horojn tage (kaj nokte)?

Mi kontentigas la malpermesitan scivolemon kaj enrigardas. Mi vidas la kolonon de l' dua semajno de januaro. Sumo de laboritaj tagoj: 6, kvanto da laboritaj horoj: — (!). Elpagita sumo post diversaj dekalkuloj por asekuroj kaj imposto: Jankowski Marjan — 12 złoty[1]), Kusiewicz Stefanja — 14 zl., Kosowski Jôzef 25, kaj poste: 15 zl., 16, 19, 9, 10, 11, 30, 9, 8, 15 ktp. Unu ricevis tiun semajnon 48 zl. (maksimumo), unu ricevis 7 zl. kaj 28 groŝojn (minimumo). Jen la tuta sekreto de la "libro de salajroj" de la fabriko, en kies negocejo mi oficas.

7 zl. 28 gr. Kiom da malsat-tagoj! Kiom da sendormaj noktoj! Kiom da duonsvenoj dumlaboraj! Kiom da eksplodoj de malespero! Kiom da pugnigitaj malbenoj! 7 zl. 28 gr.

Mia scivolemo estas kontenta. Mi alvenas la inspektejon, demandas, serĉas, malfermas la pordon kaj eniras. Post la tablo sidas la inspektoro: malgrasa persono kun maljuna vizaĝo kaj la ordinara burokrateca esprimo. Li rigardmezuras mian neelegante vestitan figuron, evidente rekonas laborulon kaj, verŝajne supozante, ke mi venas por plendi, alprenas severan, minacan mienon.

Iom miretante mi serĉas lokon por la maloportuna ĉapelo, iel ne tuj trovas kaj fine kun ĝeno metas ĝin sur la proksiman liberan randangulon de l' tablo. La minaca mieno eksplodas:

—Vi eble vian ĉapelon metos sur mian kapon, ne sur la tablon! Kiel oni povas permesi al si ion simile senhontan!

1) 1 dol. = 8 zl. 90 gr.

---

diversaj urboj la policestroj komisiis al la gazetvendistoj, noti en kajero la nomojn kaj adresojn de tiuj, kiuj aĉetas la laboristan gazeton "Novini".

Same kiel en Sofio, en aliaj urboj la Unua de Majo estis festata, kaj ĉie okazis arestoj kaj batadoj.

Bulgariano.

Kaj li komencis indignan elverŝadon de sensencaj kolero, riproĉoj kaj instruoj. Tio daŭris, ĝis li estis laca. Al mi sufiĉis. Se mi estus veninta por plendi, mi certe ne havus plu kuraĝon por peti “protekton“ . . .

Sed mi ne perdas la memregadon, ĉar mi devas prizorgi la “libron de salajroj“. Mi aŭskultas ĉion ĝis fino kaj senresponde prezentas al li la libron. Li iom ŝanĝas la konduton. Jam li parolas pli ĝentile. Tamen li ne plenumas mian postulon. Mi devas venigi la fabrikanton mem. Mi foriras kaj post mallonga tempo revenas kun lia sinjora moŝto. Li eniras la kontoron de l' inspektoro. Tiu lasta estimplene bonvenigas lin. Komenciĝas la interparolo de l' inspektoro kun la fabrikanto, kaj ili tuj intimiĝas.

Sinjoro la fabrikanto rakontas siajn ĉagrenojn; la fabriko troviĝas en apuda urbeto; pro tio li havas grandajn malagrablaĵojn:

— Antaŭe ĉe ni estis speciala inspektoro. Tre agrabla, simpatia homo. Ĉion mi prizorgis nur per li. Ofte la laboristoj murmuras, ili volas pli grandan salajron aŭ ion similan. Do mi ĉiam sendis ilin al la inspektoro. Li bone klarigis al ili, ke la pago estas ĝusta, kaj mi havis pacon kun ili. Nun la inspektoro estas elektita urbestro. Do la laboristoj ne plu fidas lin, kaj alia lin dume ne anstataŭas. Estas nun treege maloportune.

La inspektoro kapjesas kaj aldonas:

— Nu kompreneble, jes, jes . . .

La libro estas prizorgita. Ni foriras. Kio estas la laborinspektejo? Ŝtata institucio, kiu havas la devon gardi kaj protekti la laboristojn kontraŭ ĉiu ajn maljustaĵo. Ĝi devas forigi ĉiujn konfliktojn, ekestantajn inter laboristoj kaj entreprenistoj. Tio estas ĝia oficiala devo. Tamen la vero de l' burĝa sociordo fiksis al ĝi tute alian taskon: ŝajnigante protektanton, esti la sufokanto de l' laborista batalado.

Lodzano.

La kooperado kaj la batalo kontraŭ suferiloj

Antaŭ kelkaj semajnoj la estraro de la Interhelpa Societo “Union des Coopérateurs“ (Unio de la kooperistoj) kaj la Eduka komitato de la federacio de kooperaj societoj de la Pariza regiono aranĝis en la unia kino prezentadon de interesa propagandfilmo kontraŭ sifiliso: “Iam estis tri amikoj . . .“, verkita de d-ro Devraigne (Devrenj).

Unu el la kunlaborantoj de la aŭtoro prezentis la filmon per parolado priskribanta tiun teruran insidan malsanon, kiu mortigas jare en Francio 140 000 homojn. Li forte pruvis la urĝan neceson kontraŭbatali ĉiujn sociajn suferilojn.

La dirita filmo estas ja bonega propagandilo. D-ro Devraigne lerte pritraktis tiun malfacilan temon per scenoj ofte emociaj, neniam trivialaj (kontraŭe al kelkaj jam ekzistantaj samcelaj filmoj). Li elektis siajn rolulojn en diversaj medioj, oficiston, farmiston, meĥanikiston, por montri, ke la malsano povas trafi ĉiujn. La du unuaj estis infektitaj: unu sin flegis severe kaj resaniĝis, la alia ŝajnanta bonfarta malzorgis sin, la tria estas herede malsana. La filmo montras la konsekvencojn de la malsano en naskado, kaj kiel oni povas ĝin haltigi kaj venki.

La aŭtoro, kiu troviĝis inter la ĉeestantaro, tre aplaŭdate alparolis la publikon kaj dankis la kooperadon pro ĝia iniciativo. Estis la unua publika prezentado de la filmo en Parizo (ĝi nur estis prezentita private en Sorbon' antaŭ kleruloj). La spektaklo finiĝis per filmo pri la bela fondaĵo de l' Kooperista Unio: la “Kooperativa Infanaro“. Ĝi posedas sur insulo Oléron du domojn: unu por akcepti kaj flegi anemiajn, tuberkulozemajn infanojn, la alia (Feliĉa Domo“) por gastigi geknabojn dum la libertempoj. Plezure estis vidi la vivon de la infanoj tie: la ludojn, la promenojn kaj ripozon en la pinarbaroj, la banadon en la oceano, infanan feston ktp. Povas profiti la “Kooperativan Infanaron“ ne nur la parizanoj, sed la infanoj de kooperativanoj el tuta Francio. La gastigado estas relative nekara, kaj eĉ la fondo havas specialan kason, kiu ebligas akcepti senpage en la flegejo, ĉiujare, kelkajn malriĉajn infanojn.

La estraro de la kooperativo intencas prezenti la filmon “Iam estis tri amikoj“ en la ĉirkaŭparizaj sekcioj. Aliparte la laborista kooperativo “La Bellevilloise“ ankaŭ ĝin prezentis. (24)

Patriotismo — Internaciismo — Sennaciismo

PROVSTUDO

(Daŭrigo dudekkvina)

Kiam oni konas la materian, klasan bazon sur kiu stariĝis la nacioj; kiam oni komprenis, ke la klaso kiu profitas el la patrio bezonas por certigi siajn privilegiojn krei artifike patriotan ideologion, oni ne povas esperi, ke ĉesos la militoj pro la propagando de bonintencaj pacifistoj, kiuj cetere plejparte konservas ian kulton por sia patrio. Novaj militoj nepre okazos. Sed kredeble ne plu estos militoj inter la nuntempaj patrioj; estos militoj inter kontinentoj: Eŭropo kontraŭ Ameriko; aŭ interrasaj militoj: blankuloj kontraŭ flavuloj. Tiel la kadro de la nacioj krevos; la eŭropaj nacioj devos unuiĝi; kreiĝos eŭropa patriotismo, kies unuaj signoj cetere montriĝetas jam nun. La Ligo de Nacioj estas unu el tiuj signoj; alia la tuteŭropisma movado. Kelkaj klarvidaj burĝaj patriotoj jam antaŭvidas ĉi tiujn estontajn gigantajn militojn:

“Krizoj montriĝas ĉi tie kaj tie. Apud ni kiel transmare okazas senbrue aliĝoj, kiuj preparas, se ne por nia generacio, almenaŭ por la venontaj, furiozajn atakojn. Pro tio mi havas la konvinkon, ke la stariĝo de ‘eŭropa naciismo' sin trudos, en kiu la apartaj naciismoj trovos interkonsentojn[50].“

La historia procezo ja ne haltas; malgraŭ la blindaj patriotoj kaj eĉ per ilia helpo la homaro marŝas en sango kaj suferoj al neevitebla unueco.

Ni ne provis pentri la abomenindaĵojn de l' milito. Tio estas jam delonge sufiĉe farita en ĉiuj lingvoj de multege da talentaj verkistoj. Temis nur montri, ke la milito estas neevitebla; ke oni ne povas esperi eviti tian katastrofon, tiom longe, kiam la mondo ne estos unuece kaj racie ordigata; tiom longe kiam la spirito de la homoj estos regata de religia, mistika kredo.

Ĉar la racio ne regas, oni sekve povas iel konsenti kun la aŭtoroj, kiuj opinias, ke la milito estas la leĝo de la homa progreso. Ne ĉiuj militoj havis en la historio tian karakteron; sed oni ja devas konstati, ke dank' al militoj la homaro transiris el la klana stadio al la hodiaŭa, kaj tió efektive reprezentas grandan progreson.

Se estas pruvite, ke la milito estas neevitebla; se oni opinias ke kelkaj militoj estis progresigaj, dum aliaj estis regresaj[51]), tiam stariĝas jena demando: Kia estos la devo de tiu, kiu konsentas pri tiuj du punktoj? Kiel devas la Proletaro rilati al tiu problemo?

Tion ni ekzamenos en venonta ĉapitro.

STUDO

La Patrio kaj la Proletaro

Dum la daŭro de ĉi tiu studado ni vidis, kiel naskiĝis la patrioj, kiel ili evoluis, kiel ili tendencas al senĉesa plilarĝiĝo. Ni akiris la konvinkon, ke la nuntempaj nacioj estas kvazaŭ komercaj firmoj kaj reprezentas nur la interesojn de la burĝa reganta klaso.

Kio karakterizas la rilatojn inter komercaj firmoj estas la konkurenco. Ili havas egoisman bazon. La milito estas nur unu el la diversaj formoj de ekonomia konkurenco inter la nacioj. Ĉiu firmo por venki siajn konkurantojn ĉiel provas malaltigi la prezojn de siaj varoj. Tiucele ĝi pagas kiel eble plej

50) Wladimir d'Ormesson. La Tempo (Paris, 4. julio 1925).

51) Ekz. al tiu kategorio, laŭ ni, apartenas la militoj de la antikvaj Barbaroj por detrui la Roman Imperion.

RESPONDO AL PROTESTO

La "Kenajim" estas grupo el sekretaj gardistoj, zelotoj kiel la Ku-Kluks-Klano, kiuj same kiel jezuitoj, en Palestino mortigis aŭ vundis ĉiun izraelanon, kiu forgesis plenumi la leĝojn kaj portis kun si tranĉilon por fortranĉi la prepuciojn de la Idumanoj kaj aliaj laboristoj el "Izrael ha gojim", por ke ili estu konvertitaj, kaj por tio necesas sango. La lasta atako eble okazis al Spinoza, la fama etikisto. Nek li nek mi estas kontraŭsemidoj, sed simple homaranoj. Nur mi estas moderna kaj deziras la forigon de kristanismo, judismo, mahometismo kaj bramanismo. Krom tio mi tute sennaciiĝis, kaj anstataŭ diri "mi estas el balkanslava deveno", mi preferas aserti, esti el simia deveno laŭ Darvin, prefere pro tio, ke mi estas nuntempe pli haroriĉa sur mia korpo ol sur la kapo.

En Eŭropo tute ne ekzistas veraj judoj, ĉar tiuj vivas en Azio, plej grandnombre en la araba provinco Jemeno, kaj ili ankoraŭ parolas la hebrean lingvon; multaj mahometaniĝis en Palestino kaj en Afganistano, ĉar la patrino de Mahometo estis judino, kaj li akceptis la cirkumcidon, la sabaton, la fastadon kaj la manĝaĵan leĝon. La fenicianoj, ĥaldeoj kaj sirianoj konvertiĝis grandamase al izraela religio kaj per helpo de maŭroj eniris Hispanion. Ili nomas sin "sofardoj" nun kaj loĝas en Afriko kaj Balkanlandoj; parto el ili akceptis katolikismon kaj ili estas nomataj "maranjos".

Sub la influo de filosemidoj en Aleksandrio la grekoj en Azio kaj Eŭropo multnombre konvertiĝis kaj alportis la religion al Romo, el kie ĝi disvastiĝis inter germanaj triboj, slavaj gentoj kaj hungaroj, ili nomiĝas "aŝkonazoj". En Rusio regis iam la ĥazaroj, kiuj akceptis la religion de Izarelo kaj nomiĝas karaimoj.

Do, en Eŭropo vivas la aŝkenazoj, la sofardoj kaj la karaimoj. La malbenitaj jezuitoj ne nur forpelis la sofardojn el Hispanujo, sed ankaŭ mortpunadis la izraelidojn en kelkaj germanaj landoj, precipe en la Jura-montaro, en Rejnlando kaj Bavarujo. Tial ili forkuris en la slavajn landojn kaj trovis pacon sub la polaj reĝoj en Polujo kaj Ukrainio, Blankrusio kaj Litovujo. Ili portis kun si la germanan lingvon miksatan kun hebreaj vortoj por religiaj celoj, poste allernis kelkajn slavajn vortojn por kamparaj aferoj, kaj tiun lingvon ili nomis "jidiŝ" aŭ judgermana ĵargono. Ili eĉ hodiaŭ diras por "traduki" — "fardajĉn", t. e. germanlingvigi. En la deksepa jarcento du protestantaj kongregacioj, la Adamidoj kaj Abrahamidoj estis multnombre mortbruligataj en Vieno, Graz kaj Praha, pro kio la plejmulto forkuris, trovinte asimiliĝon kun la polaj izraelidoj. Tiu ĉi izraelidaro, nomata "Orienta", dividiĝis en du grupoj: la fanatikaj ĥasidoj kaj la reformemaj izraelidoj.

Ili suferadis multe post la disfalo de Polujo, precipe sub la rusaj caroj. Kvankam en Eŭropo preskaŭ ĉie post la franca revolucio la izraelidoj emancipiĝis kun rajtoj esti francoj, germanoj, hungaroj, kroatoj, italoj ktp., en Rusio neniu povis sin nomi ruso, se li ne apartenus al la grekorienta eklezio. Al ili ne estis permesate viziti la ŝtatajn lernejojn, kaj ili spertis nur malagrablaĵojn. La poloj ankaŭ kiel romkatolikoj ne havis la povon asimili la izraelidojn, krom eble kelkajn, kaj ĉiuj spertis la jugon de la caroj same tiel forte. Sed antaŭ eble tridek jaroj la malbeninda kontraŭsemida baltgermana grafaĉo Kaulbars kiel fidato de la caro aranĝis "pogromojn", en kiuj la izraelidoj suferegis, kaj multaj devis forkuri Amerikon, kaj estas unu miliono el ili en la urbo Nov-Jorko.

Pro tio pogrom-despotismo la izraelidoj sub Rusio kunvenis politike por sin defendi, uzis la ĵargonon por politikaj aferoj, nomis ĝin la judan lingvon kaj sin mem: judoj! Ili komencis interesi sin por helpo en la lando kaj faris komunan aferon kun tiuj, kiuj ne aperis esti kontraŭsemidoj, t. e. la socialistoj, revoluciuloj ktp. Tiamaniere ili organizis sin kiel tute nova nacio sur la ruslanda grundo, tradukis librojn kaj fine gazetojn. Sed bedaŭrinde inter ili venis la cionistoj kaj alportis tute novajn planojn en iliajn vicojn, la palestinan utopion, jam delonge atendatan de piaj protestantaj kristanoj. Kaj poste la "poale cionistoj", kiuj forrabis la judajn laboristojn de la tutmondaj socialistoj, ĉar tiuj estas ekstremaj naciistoj.

Fine la mondmilito finiĝis. En Sovetlando ĉiu libereco por ili, esti nun ankaŭ sovetianoj kaj tute liberiĝi, labori sur kampoj, eniri ĉiun lernejon, partopreni en la registaro ktp., dum en Polujo estiĝis klerikala registaro tenante ilin en la "getoj" kiel en Usono la indianojn en la rezervejoj; nenia libereco. La klerikalan registaron la pola diktatoro Pilsudski renversis perforte, kaj jam ili spiras pli libere, sed ŝajnas esti longa vojo, ĝis tia amaso da judoj povus poliĝi, t. e. paroli la polan lingvon, eniri ĉiujn lernejojn, ricevi poziciojn ĉe komunumaj kaj ŝtataj aferoj. Se la usonaj izraelanoj kaj riĉaj hebreoj oferus helpon al pola registaro, eble ili povus pli rapide atingi ion bonan por la malfeliĉaj polaj judoj ol per ĉiama forsendado de mono al Palestino, kie oni neniam havos sufiĉe da mono por konstrui domojn, sinagogojn, universitaton, lernejojn, vojojn, tramojn ktp.

Palestino iam estis la ruiniĝo de l' judoj kaj ŝajnas, ke ĝi ree estos, ĉar nuntempe la angloj tenas la povon tie. Sed kiam tio ŝanĝiĝos, eble la araboj ploros pro la venditaj grundoj kaj nacie vekiĝos kiel la cionistoj mem. Kaj la fino de tiu protesta utopio por malbono de la izraelidoj estos farata.

Palestinon ili nomas "Erec Jisreel" aŭ lando de Izraelo, do la nomo "judo" malaperos, kaj la lingvo tie estas la hebrea, ne la juda. El tio povas ĉiu ekkompreni, ke la vorto "juda" ne taŭgas kaj nur la vortoj "izraelido" aŭ eble "hebreo" estas la vera vorto por la izraelanoj eŭrop-devenaj. Fakto estas, ke al izraelido la vorto "Jud" (germana) estas insulto, same la vorto "juif" (ĵvif) al francparolanto, la vorto "ĵid" al slavparolanto kaj "ĵidoŭ" al hungaro. En Sovetio nuntempe ili volas distingi la judgermanan ĵargonon kiel "novhebrean" lingvon, nur por eviti la vorton "juda", ĉar tiu ĉi vorto apartenas precize al en Azio vivintaj izraelidoj. En Sovetio kaj Serbujo oni nomas ilin hebreoj, neniam judoj. Do en

---

malaltan salajron al siaj dungitoj aŭ pliperfektigas la teknikon en la fabrikoj. Tiu perfekteco cetere rezultas grandparte de la postulemo de la laboristoj. Kie la homa laborforto estas abunda kaj malkara, tie la mastroj ne estas instigataj starigi novajn, pli perfektajn maŝinojn. Kie la laboristoj ne estas organizitaj, ne estas klaskonsciaj kaj postulemaj, tie iliaj labor- kaj vivkondiĉoj estas malbonaj, eĉ se "ilia" nacio estas politike tute sendependa. Nacia sendependeco profitas nur al la burĝa klaso.

Pro manko de klereco, de komforto; pro troa laborado en senhigienaj kondiĉoj; pro senlaboreco kaj mizero, la proletoj ne povas eĉ ĝui la tiom ŝatatan kaj laŭdatan nacian kulturon. Ili posedas neniun bienon; ili ne ĝuas alte salajratan oficon en la ŝtataparato; ili estas ekspluatataj kaj trompataj de la reganta klaso. Ili sekve havas nenian intereson defendi la patrian firmon.

Se la proletoj ne estus mistifikataj per la lernejo, la preĝejo, la presejo, ili starigus al si jene la demandon, kiam temas partopreni militon por defendi la nacion:

"Ĉu la fremdaj regantoj ne bezonos niajn servojn por mastrumi la landon? Ĉu nia laborforto ne estos bezonata por funkciigi la fabrikojn kaj sekve, ĉu ni ne ricevos vivrimedojn kiel nun? Unuvorte ĉu domaĝos al ni, se nia nuna mastraro perdos la regadon?"

Tiele starigante la problemon, la proletoj certe konkludas, ke estas tute indiferente al ili, ĉu fremdaj aŭ samnaciaj mastroj ekspluatas ilin; ili konvinkiĝus, kiom stulte, trompe estas oferi sian vivon por defendi la interesojn de siaj hodiaŭaj ekspluatantoj. Ili plie starigus jenajn aliajn demandojn:

"Ĉu do niaj samklasanoj el la aliaj 'malamikaj' patrioj ne estas ankaŭ same kiel ni ekspluatataj? Sekve, ĉu ili ne havas la saman intereson organiziĝi kaj batali kune kun ni por akiri pli kaj pli decajn labor- kaj vivkondiĉojn? La vivo ĉiutage instruas al ni, ke iuj ajn mastroj cedas al niaj depostuloj nur se ni kapablas trudi ilin per striko kaj organizita agado. Al la novaj mastroj ni scios montri nian batalemon, nian kuraĝon. Sur la klasbatala kampo ni pretas eĉ esti heroaj, sed ni rifuzas partopreni militon por defendi interesojn al ni fremdajn. Se ni devas oferi nian vivon, nu, tio okazu en batalo por nia emancipo. For la trompon! La armiloj, kiujn la mastroj metos en niajn manojn, ni uzos por la klasbatalo . . ."

Tiele parolus la proletoj, se ili kapablus rezoni racie, se ilian cerbon ne infektus la patriotisma mikrobo. Bedaŭrinde tiel ne estas.

Ĉe la komenco de aŭgusto 1914, oni ja konstatis, ke la grandega plimulto da diverslandaj proletoj entuziasme ekpartoprenis la militon kaj dum jaroj elportis plej terurajn suferojn por defendi la interesojn de siaj ekspluatantoj. Krom malmulte da esceptoj, la laboristaj partioj kaj sindikat-organizoj subtenis siajn registarojn. Gvidantoj fariĝis propagandistoj de la nacia vidpunkto. Aliaj, pli bravaj, fariĝis eĉ volontuloj en la armeo. Internaciistoj forgesis la "Internacion" kaj ekkantis naciajn himnojn. Tuta Eŭropo kvazaŭ ebriiĝis pro patriotisma febro. Racie pensantaj homoj (kiom malmultaj!) apenaŭ povis kredi je tio, kion ili vidis, kion ili aŭdis. Kelkfoje ili eĉ ekdubis pri sia propra racio: "Ĉu ni mem ne estas la frenezaj kaj la milionoj da patriotoj kaj mortigistoj la saĝaj?" Ekzistas homoj, kiuj ankoraŭ nun apenaŭ povas kredi, ke la lasta mondbuĉado, kiun ili travivis, estis realaĵo kaj ne inkubsonĝo . . . E. Lanti.

(Pluo sekvos.)

Polujo oni nomas la pole parolantajn "izraelidoj" aŭ "mozeidoj", kaj la ĵargonistojn "ĵidov" kaj ilian lingvon "ĵidovski". La saman ideon havas la ĉeĥoslovakoj kaj la jugoslavoj. La plej grava afero por ili estas en Sovetio, kie ili fondas koloniojn por lerni la rusan, ukrainan, blankrusan lingvojn kaj sin tiel liberigi de ĉiu antaŭa religio aŭ naciemo kaj tradicio. Nur tiam, kiam ili perdas siajn tradiciojn, ili povas esti valoraj batalantoj por la tuthomara libereco, ĉar tiam ili ne plu dividos la homojn en du familiojn, la izraelanojn kaj la "gojim". Tiuj miaj vortoj ne estas kontraŭsemidaj, mi neniam malamis la izraelidojn persone kaj havas multajn amikojn inter ili kaj ankaŭ inter la araboj, kiuj ja ankaŭ estas semidoj.

Rilate al aĉetado, vendado kaj uzurado legu "La komercisto de Venecio" (Ŝekspir) aŭ "La kamparanoj" de Ladislas Rejmont, pola aŭtoro kiu ricevis la Nobelpremion. Venu en la "geton" de Nov-Jorko kaj demandu la pesilestron, kiom da judoj li punas pro falsaj mezuriloj. Aĉetu tie vestaĵon, kaj se li postulas $ 50, vi ricevos ĝin por $ 30. Demandu nur la aĉetintojn, kiel ili aĉetis pecon da grundo en Palestino kaj sub kiaj kondiĉoj tie estas vendata, kaj vi povas vidi, ke ĉiam la laboristo devas esti singardema! Ne nur la kristana, ankaŭ la juda.

Tiel longe, kiel la judo retenas tiun nomon per kiu li volas montri sian naciemon, nek mi nek multaj aliaj liberuloj povos fidi lin. SAT estas unu el la plej bonaj institucioj por unuigi ilin kun la aliaj sennaciemuloj.

Jen mia analizo.

D i o n i z i o A. K l a ĝ i n.



La vivo en germana popol-altlernejo

Ni, 25 junaj laboristoj el plej diversaj fakoj kaj distriktoj de Germanio kaj eĉ el eksterlando, vizitas popol-altlernejon, por klariĝi pri la gravaj kaj seriozaj demandoj de la vivo, antaŭ kiuj estas starigata la junulo. La popol-altlernejoj en Germanio estis formataj en ĉiuj urboj tuj post la milito, por ebligi preskaŭ senpagan kleriĝon al proleta loĝantaro. Precipe multaj junuloj profitis tiun okazon por akiri sciojn. Nia lernejo aranĝis kvarmonatan kurson en malnova kavalira kastelo Sachsenburg (Saksenburg), kie en la antaŭaj jaroj troviĝis malliberejo. Kompreneble, la vivo en tia konstruo estas tre interesa. Matene, je la sepa, vokas la unua sonorila signo por ellitiĝo. Post freŝiganta lavado kaj iom da gimnastiko ni kune matenmanĝas. Je la oka komenciĝas nia laborkomuno. Ni pritraktas ĉe unu instruisto politikajn, ekonomiajn kaj pedagogiajn demandojn el nuntempa vivo kaj ĉe la alia, kiu estas filozofo, ni pritraktas temojn filozofiajn, religiajn kaj psikologiajn. Tre koleriga, tamen amuza ofte estas la diskuto. Krom multaj aliaj, ekzemple la demando, ĉu libera amo aŭ leĝa edzeco, estas unu el tiaj interesaj temoj, kaj oni povas aŭdi la plej kuriozajn opiniojn pri la problemo. La antaŭtagmeza kunsido nur estas interrompata je la deka. Tiam estas disdonataj la poŝtaĵoj. Duonon post la dekdua ni tagmanĝas, kaj tiam sekvas libera horo. Je la dua komenciĝas la duhora praktika laborado en la domo, en la ĝardeno kaj sur la kampo. Sekvas je la kvara la posttagmeza manĝo, post kiu komenciĝas la libertempo por la lernantoj. Granda biblioteko ebligas utile uzi la tempon, kaj ĉiu sekvas siajn proprajn interesojn. Okazas je la sepa vespermanĝo kune kun la instruistoj, iliaj familioj kaj kun la tuta personaro de la kastelo. Post tio denove estas libera tempo. La enlitiĝo estas ĉies propra afero. Ofte okazas, ke malgranda rondo el lernantoj kun la instruisto en la mezo fervore diskutas politikajn temojn ĝis post noktomezo. Tiel pasas tago post tago. Rapide forkuras la semajnoj, kaj jam kliniĝas la kurso al sia fino. Finante mi nur ankoraŭ volas diri, ke mi dezirus, ke ĉiu juna laboristo havu la okazon partopreni tian kurson.

G a r t e n (10 512).



"Trans la Marksismo"

de Henriko de Man

Jen nova verko de belga socialisto celanta revizii, renovigi, pli precize, nuligi la marksismon. (?!) Sed, ho ve, samtempe ĝi mortfrapas, nin, la nerezoneblajn (kial ne, pli klare, frenezajn?) defendantojn de lingvo internacia!

Ni akceptu pacience la venenan sagon!

"Certe, ekzistas multaj helplingvoj, sed ĉiu homo rezonkapabla taksos ilin nur kiel sublingvojn, kiel ŝlosilojn por traduki la nacilingvajn pensojn pli malpli facile, pli malpli kompreneble. Ili tute ne estas kulturaj lingvoj, ĉar ĉi tiuj bezonas milionojn da kulturaj interligoj kaj jarcentojn da komuna celado; tiaj artefaritaj periloj apenaŭ povos solvi malfacilaĵojn ĉe la hoteloj aŭ ĉe banala korespondado. Nur du solvoj ekzistas rilate al tiu problemo: aŭ iu nuna nacilingvo formetos la aliajn kaj iĝos universala, aŭ la vortoj kosmopolitaj eniĝantaj ĉiutage en ĉiuj idiomoj, formos novan idiomon. Ĉiel, kelkajn jarcentojn por atingi bezonatan perfektecon . . ."

Se ĉiu homo skribus nur pri tio, kion li scias, kiom da inko ni ŝparus!

De Man devus scii, ke ekzistas multaj artefaritaj lingvoj . . . sur la papero, sed kiel lingvo vivanta nur . . . esperanto.

De Man devus kontroli, ke la lingvo esperanto ne estas nura ŝlosilo, ĉar ni povas efektive traduki ne nur bagatelaĵojn (vidu supre), sed ankaŭ plej seriozajn ideojn.

Li devus vidi krome, ke nia lingvo estas precize la dua de li menciita solvo por la problemo de lingvo internacia, solvo nur rapidigita, modifita per la homa volo kaj la homa intelekto. Sed eble li opinias, ke la homo povas influi la arton, la moron, la ekonomion, ja ĉion krom . . . la lingvo, moderna "tabuo"[1]) de la fisciencistoj.

F. A z o r i n.

La marŝo de la danaj senhejmuloj

La eksterlandaj gazetoj priparolis la "marŝon de la danaj senhejmuloj" per malmulte flataj vortoj. Oni rakontis pri perfortaĵoj k. s. Tio kompreneble estas mensogo. La sola "perfortaĵo" estis, ke oni forigis la "teknikan gvidanton" (kiu sekrete estis sendita de la registaro!). Kiel oni scias, la manifestacio disiĝis tute pace en la urbo Vejle. Poste multaj senhejmuloj daŭrigis la vojaĝon, kaj la 20. marto okazis granda manifestacio de senhejmuloj, studentoj kaj kelkaj senlaboruloj en Kopenhago. Tie oni vizitis la registaron, kiu rifuzis doni manĝaĵon kaj dormejojn al la senhejmuloj, sed nur povis proponi malriĉulejon. Nun la senhejmuloj fondis landorganizon kaj eldonas sian propran gazeton. (11 082)

DIVERSAĴOJ

Sofia Laborista Esperanto-Grupo petas ĉiujn klaskonsciajn laboristojn en la mondo pri helpo, ĉar grandega tertremo detruis preskaŭ ĉiujn urbojn kaj vilaĝojn en Suda Bulgario. Krom multaj mortigitoj kaj vunditoj nun pli ol 200 000 homoj estas sen loĝejo kaj nutraĵo. La malsufiĉa registara helpo kaj tiu de burĝaj institucioj estas moko al la suferantaro. La proletara solidareco helpu efike! Sendu la monon al la alvokanta grupo, kiu transdonos ĉiujn ricevitajn monrimedojn al la Centra Lab. Helpa Komitato. Sendu prefere en franca, germana, angla, usona, svisa aŭ aŭstra valuto, kaj senescepte nur per registritaj leteroj al jena adreso: Bulgario, S o f i o, str. "Pozitano" n-o 7, Rabotn. Partija (por SLEG). La sovetianoj sendu ĉion pere de Esperanto-Servo de SAT, Leipzig C 1, Gerberstr. 24, Germ.

* * *

La sovetia ilustrita ĵurnalo "Ekrano" estas ofte sendata al eksterlanduloj, kiuj montras grandan intereson pri ĝi, sed ne povas legi la ruslingvajn bildtitolojn. Certe la redakcio de "Ekrano" sekvos la ekzemplon de "AIZ", se ĝin instigos K-doj diversregionaj. Pro tio direktu tiurilatajn petojn al: Redakcio de "Ekrano", Tverskaja 3, M o s k v o. (2419)

[1]) "Ne tuŝu!"

Kompreneble tio ĝojigas la Redakcion, kiam ĝi ekscias, ke "S-ulo" plaĉas al la legantoj; sed nia ĝojo estas multe pli granda, kiam la Administracio sciigas, ke alvenis kelkaj novaj abonoj . . .

Varbadu senĉese, senlace! Ĉe la apero de ĝia 200-a n-o VIA gazeto havu 4000 abonantojn! . . .

TRA ESPERANTIO

EL LA REDAKTEJO

Estas utile revoki en la memoron de la K-doj, ke ĉiuj manuskriptoj, kiuj estas destinitaj por aperigo en difinita n-o de "S-ulo", estu en la manoj de la Redakcio almenaŭ 15 tagojn antaŭ la aperdato de la koncerna n-o. Ĉar la procedo estas jena: ĉiun vendredon vespere ni ekspedas de Parizo la tutan manuskriptaron pretigitan por unu n-o al Leipzig por la presigo. Sekve, se ni ricevas manuskriptojn ĵaŭde aŭ vendrede, ni kompreneble ne povas garantii, ke ni pretigos ilin ankoraŭ kun la forsendata materialo en tiu vendredo. Se ili ne estas t r e urĝaj, ili do nur havas ŝancon, esti ekspedataj unu semajnon pli malfrue. Dume la materialo, kiu nin atingas en la unuaj tagoj de la semajno, tre bone povas esti prilaborata ĝis la vendredo, la ekspeda tago. Alveninte dimanĉon aŭ lundon matene en Leipzig, la materialo estas transdonata al la kompostistoj, kiuj kompostas ĝin ĝis fino de la semajno, inkluzive la korektoj post legado de la presprovaĵoj. La sekvantan lundon ĝi estas finpresata kaj mardon komenciĝas la ekspedado de la gazetoj, kiuj portas la aperdaton de ĵaŭdo samsemajna. Ni diru, K-do el Moskvo sendas al ni manuskripton la 13-an de majo. Ĝi atingas nin post sestaga vojaĝo, do la 19-an. Proksiman vendredon, t. e. la 25-an, mi povos liveri ĝin al la presejo. Ĝi do troviĝos en la n-o kun dato de 7-a de junio. Tiu n-o trafos en la manojn de la K-doj el Parizo, Moskvo, Tokio ktp. 2, 3, 6, 10, 15 aŭ 30 tagojn post tiu dato laŭ la distancó inter tiuj lokoj kaj la ekspeda loko Leipzig. Sekve pasis de la forsendo de l' aŭtoro ĝis la ricevo de l' leganto 8 semajnoj (13. 5. ĝis 7. 7.). Kaj se la verkinto loĝas en Tokio, tiu intertempo grandiĝas ankoraŭ je 4 semajnoj. Tiel klariĝas niaj limfiksoj en liverado de materialo por certa n-o kaj la kelkfoje ŝajne malfrua apero de artikoloj.

Al verkemaj novaj esp-istoj ni denove direktas la admonon: U n u e f i n l e r n u l a l i n g v o n, p e r f e k t i ĝ u g r a m a t i k e k a j s t i l e, kaj nur poste komencu verki. Aliel ni ĉiam kaj ĉiam renkontos leterojn kiel tiun de K-do el B., el kiu ni kelkajn liniojn reproduktas senŝanĝe kun ĉiuj malkorektaĵoj, por pruvi al la K-doj, kian danĝeron signifas tia skribado por la kompreneblеco de nia lingvo! Jen eltiraĵo el la teksto:

"... ne batali kun frato, nune, neniam ne malŝpari vorto kontraŭ religio ne teni vi penso en malliberejo pli fortigu via povo agi tenu en vian koron la faiĵo de amo de homaro, homaro (mi ne intencas en senco parizitaj frostigas vizagoj koroj ktp.), en unu vorto antaŭ ekonomian ordo nun ekzistis homaro unigu super partio laŭ via klasson en nomo de la ankoraŭ sen naskigas de la estonto..."

Tiu ekzemplo estu averto al ĉiuj K-doj, kiuj ankoraŭ lernas kaj ne sukcesas sin esprimi klare kaj almenaŭ kompreneble! Ili gardu sin antaŭ troa memfido kaj prokrastu la verkadon ĝis pliperfektiĝo!

R e d.



RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

Nik. Hohlov: La Tajdo. Liriko. Poemaro. Kun portreto de la aŭtoro. 64 pĝ. broŝ. Prezo 1.20 g. mk. (1.50 sv. fk.) Eld. "Heroldo de Esperanto", Horrem b. Köln, Germ. — La aŭtoro, kiu ĝis nun nur elpaŝis per kelkaj versaĵoj en neŭtralaj gazetoj, elverŝas per tiu ĉi volumeto tutan faskon da originalaj poemoj, sume 38. El ili kelkaj sendube estas akcepteblaj, se oni konsideras ilin kiel lirikajn elfluojn senpretendajn. Ili estas pluso por la originala esp-a literaturo, sed ne pluso, laŭ mia opinio, je novaj, kreaj ideoj. Ili restas en la reloj de pasintaj epokoj, kaj oni sentas la perforton tie, kie la aŭtoro serĉas novajn formojn. Tro multaj estas la artifikaĵoj, kiuj malnature efikas, kvazaŭ turmente produktitaj. La "ultraviola" versaĵo kun "la vibro de l'ritmo kreanta en la pra-metriko etera" estas malbona ŝerco (pĝ. 58). Komprenebla fariĝas la "limigiteco" de lia liriko, se ni legas lian propran konfeson (pĝ. 15): li sin nomas "la duonlaca rusa senhejmul'". Sendube li ne plu komprenas la postrevolucian popolon, starante sur la alia flanko de la barikado... Tamen li suferas mem, kiel montras multaj aludoj, sub tiu "elradikigiteco". Nur en unu versaĵo (1905, Moskvo) li prikantas la ekribelon de l' popolo, sed sen konkludo, sen senteblaj signoj de varma aprobo. Karakteriza por tiu "fremdeco" al la novaj ideoj de libereco estas "Mia patrujo" (pĝ. 53). La patrioto "ofte havas minutojn de malĝojo, tremas kaj sopiras... kaj la teron kisas en humilo"... "vi (la patrolando) aperas antaŭ mi dolora..." Ĉu do ni miru pri la ofta malpleneco en liaj versoj? Lingvon k rimojn — ne konsiderante la enhavon — oni povus nomi perfektaj, se ne trous la neologismoj. Ankaŭ la poeto devas moderigi siajn bezonojn rilate al kreo de novaj vortoj! Kiom da nebezonaĵoj! Ni notis: "s e n t i n e l i, gaŭlo, atolo, lucerno, finala, obsedi, svelta, sledo, bravura (!)", por citi la plej karakterizajn. Kial tiuj vortoj? Krome erare estas uzitaj (pĝ. 31) "smaragdo" anst. "smeraldo", "poligis" anst. "polusigis". Sekve, eĉ de lingva vidpunkto, mi ne povas rekomendi tiun forte parfumitan lirikaĵon al la K-doj.

N. B.

Aleksej N. Tolstoj: La morto de Danton. Tragedio. El rusa lingvo trad. N i k. H o h l o v. 75 pĝ. broŝ. Prezo 1.60 g. mk. (sv. fk. 2.—). Eld. Heroldo de Esperanto, Horrem b. Köln, Germ. — Mi legis tiun dramon en 12 bildoj kun granda intereso, ĉar ĝia enhavo tuŝas la problemojn de l' aktualeco. Estu dirate, ke la dramo ne ĉiam respegulas la veran historian okazon. Sed tion ja ne celas la dramaŭtoro. Plej bonsukcesa ŝajnas al mi la 11-a bildo (Danton kun siaj amikoj en la malliberejo dum la nokto antaŭ sia ekzekuto). La traduko estas flua k glata; ni riproĉas tamen la neologismojn "gapi, graŭli, fuĝi (?), memuaroj, ŝminki". Kial malsimpligi la legadon? Krome, la Karmanjolo (pĝ. 17) estas fuŝtradukita.

N. B.

Petr Dânov: La alta idealo. 1-a kajero de Biblioteko "Nova Kulturo", eld. At. Nikolav, str. "Car IV. Ŝiŝman" n-o 19, B u r g a s, Bulgario. Jarabono 3 sv. fk., unu n-o 0.40 sv. fk. Specimeno senpaga. Tiu broŝuro (k

TRA LA MOVADO
(Kroniko)

AŬSTRIO. Vieno. La aŭstria SAT-rondo kunvenas ĉiulunde vespere de la 7-a ĝis 10-a horo en Vieno XII, Neuwaldgasse 27, ŝtuparo 17. — **BRITIO. Londono.** Dum la unu-majaj manifestacioj aŭdiĝis esp-o en Londono k Glasgovo. Speciala saluto aperis en "Labour Woman" (Laboristino). Longa art. en "Labour Magazine" (ofic. ĵurn. monata de Lab. Partio). En "Daily Herald" (Ĉiutaga Heroldo) estas anoncita speciala perkoresponda rapidkurso, kiu kostas nur 2 ŝ 6 p. (488.) — **POLIO. Varsovio.** Lab. Esp. Societo "Laboro" en Pollando ne plu lokiĝas ĉe str. Novogrodzka, ĝia adreso nun estas: str. Marszalkowska 81; ĉe J. Litauer, kien oni devas direkti ĉiujn sendaĵojn. La Societo organizas dum pentekosto en Krakovo konferencon de ĉiuj lab. grupoj esp-aj en Polio. Pro tio ĝi alvokas ĉiujn interesatojn, ke ili laŭ la supra adreso sin anoncu antaŭe (tel. 224—74). — **SOVETIO. Krivoj-Rog.** Dum 1. majo la esp-a organizo elpaŝis memstare sub propra standardo, pri kio raportis la loka gazeto "Ruĝa Ministo". M. R. — **Kursk.** En la urbo funkcias rondetoj ĉe Domo de Kleriglaboruloj (4 p.) k ĉe Klubo de Fervojistoj (7 p.), gvid. K-do Riŝkov, ĉe hebrea 13-a lernejo (5 p.), gvid. K-do Konjuĥovskij, ĉe Aparta Roto de Ligilo (15 ruĝarmeanoj), gvid. K-do Lakomkin k ĉe Vespera Lernejo por Plenaĝuloj (25 p.), gvid. K-do Djatlov. Ĉiun unuan dimanĉon okazas kunsidoj de Urba Kom. SEU k SAT-grupo. Aliajn dimanĉojn "esper-tagoj" aŭ "tuturbaj kunvenoj". La esp-istoj partoprenis 1-majan manifestacion sub propra standardo k kantis esp. kantojn, disdonis flugfoliojn. (5296.)

INFORMO DE LA ESPERANTISTA AKADEMIO

Jen la rezultato de la E l e k t o j en l a L. K.:

Nombro de la L. K.-anoj	126	
Voĉdonis	92	
Plimulto	47	voĉoj

Estas elektitaj:

S-roj Muĉnik	89	voĉoj
„ Sabadell	88	„
„ Drezen	87	„
„ Bofill M. Granada	86	„
„ Ghez	85	„
„ de Menil	84	„
„ Zwach †	83	„
„ Uitterdijk	81	„
„ Sepúlveda Cuadra	78	„

Je nia granda bedaŭro s-ro Zwach mortis dum la balotado. Lia nomo tamen staros en nia Jarlibro 1928.

La Prezidanto: T h. C a r t.

la sekvontaj eldonotaj) celas propagandi doktrinon de sekto, kiu sin nomas Blanka Frataro. Laŭ la antaŭparolo "tio estas okulta movado en Bulgarujo, kiu ampleksas homojn de preskaŭ ĉiuj klasoj de la popolo" (pĝ. 8). Ĝia "majstro" estas Petr. Dânov, kiun (kompreneble) la disĉiploj "adoras" (pĝ. 13). Kuriozaĵo estas, ke el la 24-paĝa broŝuro nur 10 paĝoj estas de Danov mem, la cetero estas antaŭparoloj. La lingvo estas flua k korekta. N. B.

Leipziga Foiro. Prospekto. Adreso: Leipziger Messamt, Esperanto-Fako, Leipzig, Markt 4, Germ. — Ĉu ne estas mirige k iel hontige, ke la komercistoj pli larĝe utiligas esp-on ol la t. n. internaciistoj? Tian penson venigas en nian spiriton la bele presita k ilustrita prospekto de la Leipziga Foiro. Tiu propagandilo estas senpage ricevebla.

MEMORNOTO

Represis el "Senn. Revuo": Uj Elöre (Nova Antaŭen), Nov-Jorko, 10. 4., 11. 4. (Du francaj forkurintoj.)

Represis el "La Lernanto": La Ora Epoko, Baden, marto (div. el. feb. n-o).

Enhavis priesper. artik. k notojn: Daily Herald, Londono, 4. 5., El Socialista, Madrid, 24. 4. (ankaŭ pri SAT-kongr.), Bulteno de ITF., aprilo, Bolŝevistskaja Smena, Rostov, 1. 5., D. Deutsche Eisenbahner, Berlin, 29. 4., 6. 5. (kurso), Semajna informilo por interligo kultura kun Sovetio, Moskvo, N. 14/15 (Resumo en esp-o).

Peresper. leterojn presis: Leninec, Rostov, 24. 3., Za Mir i Trud, Novoĉerkask, 13. 4., Leninskije Vnuĉata, Rostov, 22. 4., Bolŝevistskaja Smena, Rostov, 1. 5., Molot, Rostov, 1. 5. (let. de 19 organizoj el Vieno), Työn Ääni (Labora voĉo), Vaasa, apr.

NIA POŜTO

4544. — Viaj "Notoj" estas tro ampleksaj por trovi nun lokon en "S-ulo". Ni preparas legolibron kun jena titolo: SAT-ana Krestomatio, kaj en ĝi ni povos utiligi vian priskribon. E. L.

11 220. — Ni aperigos vian artikolon.

4130. — En tiu ĉi n-o jam troviĝas simila "Alvoko" de alia grupo. Sekve ni ne presigas vian, kiu rilatas la samon. Red.

4998. — Viaj kovertoj denove revenis. Adm.

K * O * R * E * S * P * O * N * D * A * D * O

Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0,50 mk. g., ĉiu plia linio la samon. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.
L = letero, PK = poŝtkarto, PI = poŝtkartoj ilustritaj, PM = poŝtmarkoj, bfl = poŝtmarko sur bildflanko, kĉl. = kun ĉiuj landoj, esp-aĵo = esperantaĵo.
Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

ĈEĤOSLOVAKIO

K-do Jos. Schweinfurter, Holeischen, n-o 213 ap. Pilsen, dez. koresp. pri historio de socialismo, socialmovadoj k pri taktikaj teorioj de socialismo nur kun seriozuloj.

Filatelistoj ĉiulandaj! (krom Sovetio). Se vi volas interŝ. PM kun nia lando, turnu vin al K-do Johano Riha, Dessendorf, n-o 157. Resp. garantiata.

FRANCIO

K-do Ed. Liegeois, 2 Rue des Casernes, Orchies (Nord), dez. interŝ. L, PK, PI, kĉl. Resp. garantiata.

K-do J. Fourreau, 103, Rue d' Anvers, Lyon, 7, dez. koresp. pri ĉ. temoj kĉl. PK, PI.

GERMANIO

K-do Kurt Eulitz, Hohe Str. 100, Dresden-A., dez. koresp. kĉl. pri lab. temoj. Resp. garantiata.

— Gelernantoj dez. koresp. kĉl. Resp. garantiata. Adr.: Lab. Esp. Grupo Regensburg, Sekcio Margaretenau, Gastejo Sportplatz, Prüfeningerstr.

K-do Konrad Fickelscheer, Hoditzstr. 9, Potsdam, dez. interŝ. PI, kĉl. Resp. garantiata.

Adresŝanĝo: Gek-doj Erich Endler (6523) k Gertrud Bechert (6524) loĝas nun: Markgrafenstrato 36/1, Selb (Bavario).

K-do Gerhard Herzog, Leutersdorf, C 117 i. Sa., dez. koresp. kĉl., precipe kun migromovadanoj, fotoamatoroj k sportuloj, PK, PI, bfl.

HISPANIO

K-do M. Aguilera, str. Gallo 56, 1-a, Barcelona (Hostafranchs), dez. interŝ. PI, bfl, kĉl. Akurate respondos.

NEDERLANDO

Adresŝanĝo: Depost nun la adreso de K-do Niko Smit (10 673) estas: Anglio, Craigmillar near Edinburgh, prestonfield nursery.

Adresŝanĝo: K-do W. Wessels (12 721) loĝas nun: de Wittestr., 7, Amsterdam.

PERSIO

K-do Bogdano Hajrapetjan, "Persazneft", Téhéran, dez. interŝ. kĉl.: kolorigitaj pk. de ornamaĵoj, keramik-, miniatur-, mozaik- k pentraĵoj de tapiŝoj, skulpt- k floraĵoj, japanaj-ĉinaj pentraĵoj k c. — preferinde de bonaj arteldonoj.

SOVETIO

K-do P. Karuzin, n-o 69, Trubnikovski 19, kv. 13, Moskvo (bibliotekisto,fotoamatoro), dez. koresp. pri unuecigaj slipoj, formoj de eldonaĵoj, libroj, papero, politiko k sennaciiga klerigado.

— Distrikta komitato de fizkulturo dez. koresp. kĉl. Adr.: Krivoj Rog, Soveto de fizkulturo.

— Distrikta virinkomitato dez. koresp. kĉl. Adr.: Krivoj Rog, Okrĵenotdel.

— Liberpensula ĉelo ĉe junkomunista organizo dez. koresp. kĉl. Adr.: Krivoj Rog, I. P. Ŝ., liberpensula ĉelo.

K-do A. Jurĉenko, Sennoe, Ĥark. okr., dez. longdaŭran, seriozan koresp-adon kĉl. pri ĉ. temoj, L, PI.

K-do Mikaelo Sannikov (instruisto) selo Voĵgali, Vjatk. gub. i. uezda, dez. koresp. pri ĉio. L, PK, PI, PM, bfl.

K-do Gregoro Kuvatov (instruisto), Ĵeleznodorojna ŝkola, Dĵankoj, Krimeo, dez. koresp. pri ĉ. temoj kĉl. L, PI, fotoj.

K-do Aleksej Stroganov (junkom-isto), 1-a Uspenskaja 32/25, St. Uŝakovo, Ivanovo-Voznesensk, dez. koresp. kĉl. ĵurn., gaz. Resp. garantiata.

K-do R. Sergijev, str. Gogola, 52, "Promsojuz", Barnaul, dez. interŝ. PI, PM, kĉl.

K-dino S. Levinbaum, Sovetskaja 125, kv. 1, Minsk, dez. koresp. pri div. temoj kun eksterl. gek-doj.

— Ruĝarmenanoj-esp-istoj de N-bataliono de Ruĝa Armeo dez. koresp. kun lab. organizoj kolektive k individue, kĉl. Adr.: K-do A. Nikitin, Pereulok Karafa, Korbuta 2, Bobrujsk.

K-do A. Somov, Domo de Sovetoj, Okrplano, Pskov, serĉas koresp-antojn por siaj lernantoj, precipe kun komencantoj. L, PK, PI. Nepre resp.

— Esp.-rondeto de Centra Biblioteko, Sovetskaj pl., Pskov, dez. koresp. kun esp.-rondoj de a. bibliotekoj k bibliotekistaj individuoj, kĉl.

K-do Beitelmacher (oficisto), Grupkom Sovtorgsluĵ 1, Lenin, prosp. Kremenĉug, dez. koresp. pri div. temoj kĉl., precipe pri lab. vivo k movado.

— Esp.-rondeto de 5-a Laborlernejo, dez. koresp. kun infanaj k pioniraj grupoj. Adr.: Kiev, Konstantinovska, 9, Trudŝkola, 5, al Kruĵok Esperanto.

Atentu!
Leningradanoj faras grandegan laboron, por disvastigi nian movadon inter ĉi tiea Laboristaro. Oni organizas ekspoziciojn, utiligas materialojn en gazetaro ktp.
Pro tio ni bezonas la helpon de l' tutmonda Proletaro. Sendu interesajn priskribojn de faktoj, eltranĉaĵojn gaz., ĵurn. k. a. esp-aĵojn. Resp. garantiata. Helpu al ni!
Adr.: Leningrad, poŝtkesto 305, al prezidantaro de "Lab. Int. Interligilo"

Peto
Mia filo Vencel Lingel malaperis dum la mondmilito en Rusio. Se iu iom scias pri li, bonvolu skribi al Drago Lingel, Ruŝe ĉe Maribor (Jugoslavio).

LA GRANDA DISVASTIĜO DE
PETRO
la kursa lernolibro por laboristoj laŭ la rekta, parola metodo
pruvas nedisputeble ĝian taŭgecon por la instruado.
En la formo de interesa, alloga rakonto kun klasbatala tendenco la komencanto lernas kun plezuro kaj laŭ modernaj principoj nian lingvon.
64 paĝoj. — Prezo: 0,70 gmk.

ENHAVO:

	paĝo
La idealo de l' Proletaro	271
Instrua okazaĵo	272
Faktoj kaj komentoj	272
Unua de Majo en Bulgario	272—73
Vojaĝaj impresoj el suda Ameriko	273
El Polio	273—74
La kooperado kaj la batalo kontraŭ suferiloj	274
Patriotismo — Internaciismo — Sennaciismo	274—75
Respondo al protesto	275—76
La vivo en germana popol-altlernejo	276
"Trans la Marksismo"	276
La marŝo de la danaj senhejmuloj	276
Diversaĵoj	276
Tra Esperantio	277—78
Korespondado, anoncoj	278

Presejo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio)